

Esperanto *en Danio*

25-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2018




UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIIO

ESPERANTO- TAGO

26.07.2018

Justa
komunikado

Ellernu
Esperanton:
www.lernu.net

Pri lingvoj: www.lingvo.info
Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Finn Østerbæk (kasisto)

Ileana Schrøder (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Arne Casper

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2018

Enhavo

[Post la 103-a UK en Lisbono.....3](#)

[Kopenhago.....4](#)

[En la provinco.....5](#)

[Sukceso en la Roskilde-](#)

[Festivalo.....6](#)

[Du danaj novuloj en SES.....7](#)

[Voĉlegado de la revuo](#)

[Esperanto.....9](#)

[Unua “Forumo de Unesko-](#)

[Kuriero”.....10](#)

[Salutmesaĝo de Unesko al UK](#)

[.....14](#)

[Mesaĝo de UEA al UN.....15](#)

[Japano en Lisbono.....16](#)

[Nova estraro de TEJO.....18](#)

[Ĉeĥa opero en Esperanto.....19](#)

[Diverse internacie.....20](#)

[Katalin Kováts premiita.....22](#)

[Pliaj 14 elstaraj diplomitoj.....23](#)

[Grabowski-premiitoj.....26](#)

[Nia filmo.....27](#)

Post la 103-a UK en Lisbono

Nia grupo havos belajn rememorojn pri bela urbo, sed ankaŭ pri la varmego kiu subite okazis dum la lastaj tagoj de la kongreso, kun temperaturo de pli ol 40 gradoj! Feliĉe por la kongresanoj, la kongreso okazis en la imponaj salonoj de la Jura Fakultato, kie la klimatiziloj bone funkciis.

Kelkaj kongresanoj sendis rete malgrandajn filmetojn, tiel ke ankaŭ aliaj esperantistoj povis sperti partojn de la programo, kiel la nacian kaj internacian artajn vesperojn kaj aliajn momentojn. Niaj finnlandaj amikoj bone reklamis por la venonta kongreso en Lahti, sed ankaŭ la kanadanoj estis tre aktivaj en la varbado por la 105-a kongreso en Montrealo.

Kiel komitatano por Danio, mi precipe ĉeestis la komitatajn kunsidojn, kiuj estis speciale gravaj ĉi-jare ĉar UEA havas financajn problemojn. Ni multe diskutis pri tiu grava afero. Fine oni akceptis plialtigi la kotizojn komence de la venonta jaro, pri kio ni aparte skribos aŭtune, kiam venos la tempo remembriĝi. Sed jam nun ni apelacias al niaj membroj pripensi donaci iun sumon al UEA por plibonigi la situacion, aŭ fariĝi dumvivaj membroj. La kaŭzo de la defcito estas precipe, ke dum la lastaj jaroj, post la financa krizo, la rentumoj ege malplialtiĝis, kaj samtempe malkreskis la membraro.

Ileana Schrøder



La danaj partoprenantoj en Lisbono

Kopenhago

Konversacia Esperanto-Klubo regule kunvenas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, lunde je la 19.00 horo en la ĉambro B. Eniru tra la malantaŭa enirejo en la parkejo. Premu butonon sur la dekstra muro por malfermi la pordon aŭ voku 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

Sabate 18. aŭgusto Paralela Universo

Tiu koncepto komenciĝis antaŭ du jaroj en Norda Ameriko. Oni renkontiĝas samtempe en 25 diversaj urboj. La celo estas ke ĝi evoluu al mondskala okazaĵo. Krom bona maniero renkontiĝi ĝi estas bona okazaĵo por reklamo al la ekstera mondo.

Je la 12-a horo ni renkontiĝos en restoracio Rizraz Kompagnistræde 20 por komuna manĝado. Ni rezervas kvietan angulon kie ni povas babili kaj skajpi kun la ekstera mondo kiel lastjare. Poste ni promenos en la parko aŭ simile.

3. septembro je la 19a horo

Universala Kongreso en Portugalio. Partoprenintoj rakontas

10. septembro je la 19a horo

Kion fari en Esperantujo?

La ekstera mondo kredas ke Esperanto estas morta lingvo. Bona okazo eksplori la uzeblecojn de nia lingvo, ĉar ĉiusemajne estas aranĝo ie en la mondo. Ni diskutas kiuj aranĝoj estus interesaj por ni se ni havus tempon, monon ktp.

Ni uzas la retejon <http://www.eventoj.hu> por la venontaj tri monatoj.

17. septembro je la 19a horo

Babila vespero – studgrupo ktp.

24. septembro je la 19a horo

Lumbild-prelego

Moldova-brazila geedziĝo en Ĉehio kaj diversaj impresoj de Brno kaj Prago. La semajno en Ĉehio okazigis al mi multajn pensojn pri lingvaj aferoj. Rakontas Bent.

1. oktobro je la 19a horo

Tio estas mia (esperanta) vivo. Persono ankoraŭ ne elektita

8. oktobro je la 19a horo

Betty rakontas: Ĉu oni nur ripozas en ripozejo? Miaj impresoj kaj travivaĵoj okaze de esperantiste aranĝita feriado en ripozdomo en la urbeto Łądek Zdro, Pollando 1-an ĝis la 9-a de septembro 2018.

15. oktobro: Aŭtuna ferio!

22. oktobro je la 19a horo

Rakontu pri libro kiun vi legis aŭ filmo kiun vi spektis, kiujn vi povas rekomendi aŭ malrekomendi al la aliaj.

29. oktobro je la 19a horo

Jan kaj Lene Niemann prelegas. La temo: IFEF-kongresoj dum nia tempo – de Danio, Norvegio tra Pollando dum jubilea jaro al fora Ĉinio.

5. novembro je la 19a horo

Babila vespero – studgrupo ktp.

12. novembro je la 19a horo

Peter Wraae rakontas pri la siatempa Lyngby Esperanto-Klubo kaj montras gazet-eltondaĵojn pri ĝi. Estas pluraj amuzaj kaj interesaj detaloj.

En la provinco

Kunvenoj de la Esperantoklubo de Århus (informoj: Tobias Nowak, tel. 41 24 40 64) okazas en Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1., salono 7, je 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: Ejnar Hjorth, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en Christiansgade 38, 1., Aalborg.

Sukceso en la Roskilde-Festivalo

Dana Esperantista Junulara Organizo raportas:

Dum la plej granda rok-festivalo de Danio, Roskilde Festivalo, kun pli ol 100.000 partoprenantoj, nia 'eta' grupo de 55 homoj faris laboron por la festivalo – ĉi-jare denove kiel gardistoj de pordego 19, unu el la grandaj enirejoj inter la tendaro kaj la koncertejo.

Ni havis tre sukcesan kunlaboron ĉi-jare; ni laboris por Roskilde kaj por Esperanto, disdonis informilojn pri Esperanto al la festivalanoj, interalie la etan frazlibron 'Festivalparlør dansk-esperanto' per kiu festivalanoj povis lerni kelkajn amuzajn kaj utilajn frazojn en Esperanto.

En nia 'bazejo', kiun ni mem konstruis en loko provizita de Roskilde Festivalo, ni manĝis vegane kaj Kim instruis Esperanton al la komen-cantoj. La bazejo funkcias kiel nia propra loko kun luksaj kondiĉoj por ripozi kaj interkonatiĝi. Tie ni povas uzi kaj praktiki Esperanton en bona etoso.

Ni tre ĝuis la festivalon kaj ripetos la sukceson venontjare – kaj vi povas jam nun aliĝi ĉe <http://roskildefestivalo.dk/>.

Ĉiuj bonvenas, sendepende de lingvokono; ni havas kurson de Esperanto de la 10-a ĝis la 12-a horo ĉiutage.



Ujutna skandinavia etoso



Facila alveno de Kopenhago aŭ Malmö

3x8h Laboro per Esperanto en amuza teamo kun multaj esperantistoj

€ 0 Partopreno en mondfama rokmuzik-festivalo (kutime € 250!)

€ 0 Komune kuirita vegana manĝo

€ 0 Loĝado en komunaj tendoj

€ 32 Luksa tendejo / antaŭpago

Du danaj novuloj en SES



Kiam ni ricevis la vokon de Ileana, kiu bonvenigis nin al DEA, aliĝi al SES (Somera Esperanto-Studado en Slovakio), nova mondo malfermiĝis. Signe tiutempe lernis Esperanton nur ekde marto – iomete per Duolingo kaj pere de interŝanĝo de simplaj frazoj kun René. René komencis lerni pli-malpli unu kaj duonan jaron antaŭe pere de diversaj inter-

retoj kaj ankaŭ komunikis iomete per fejsbuko kaj retpoŝto. Ni ambaŭ neniam vive parolis kun aliaj esperantistoj. Do per la voko ni vere eksciis ke la lingvo estas tre vivanta.

Ni faris multajn pensojn antaŭ ni alvenis al SES. Kiom multe ni komprenos? Ĉu ni mem estos kompreneblaj? Ĉu estas en ordo demandi angle pri io? Ĉu ni kapablas ricevi instruadon ne ĉiam konsultante la vortaron? De la flughaveno en Kosiĉe ni vojaĝis kun Peter Wraae, kiu donis bonajn rakontojn pri siaj travivaĵoj en Esperantujo. Ankaŭ estis trankvilige renkonti alian danan esperantiston tuj antaŭ la granda “esperantistaro”.

Ĉe la alveno ni tamen estis solaj denove, ĉar Peter loĝis aliloke. Kaj kiam ni komencis paroli, la mondo denove grandiĝis. La volontuloj kiuj bonvenigis nin parolis Esperante, sed ankaŭ ne estis problemo paroli angle – ekzemple oni devis subskribi dokumenton pri partoprenado en propra respondeco kaj tiu dokumento ekzistis kaj Esperante kaj angle.

Kiam oni partoprenas kiel komencanto, oni ankaŭ devas atendi grandan defion. Dum la semajno Signe havis frustriĝojn ĉar ŝi ne pensis ke ŝi sciis

sufiĉe la lingvon por montri same multe da intereso al aliaj kiel ili al ŝi. Ekzemple dum manĝado aŭ en trinkejo ni renkontis multajn interesajn personojn kiuj ŝatis demandi pri niaj vivoj. Plej ofte eblis doni kompreneblan respondon, ĉar en tiaj situacioj oni havas referancan kadron. Sed konstrui novan demandon estas pli komplika afero, kiu necesigas pli grandan pretan vortprovizon. Feliĉe ĉiuj estis afablaj kaj helpemaj.



La ĉiutageco krom la manĝoj konsistis el antaŭtagmeza instruado kaj libera posttagmeza programo kun prelegoj kaj aktivaĵoj. Merkrede estis tuttagaj ekskursoj kaj ni partoprenis en ekscita kaj bela monta grimpado. Dum tiu ni ankaŭ faris bonan parolan trejnadon pro la sufĉeco da tempo.

Vendrede kaj sabate ni mem akceptis fari instruadon pri nia intereso akrobata joko (akrobata joko). De hejme ni preparis gravajn vortojn kaj manuskripteton. Tiutage ni estis iomete nervozaj kaj tre koncentritaj. Korpa lingvo estis bona helpo – same tia estis la vortoj “ĉi tiel”. La instruado estis sukcesa, ni plu spertĝis en parolado kaj plej grave: ĉiuj amuziĝis.

Nun ni denove estas hejme en Odenso kun bonega impresa travivaĵo kaj pliriĉiĝintaj je multe da amikoj!

Ĉu ni partoprenos venontan jaron? Ni ankoraŭ ne scias – sed ni tutcerte ne partoprenis en nia lasta esperanta aranĝo!

Signe Capion kaj René G. M. Nielsen

Konsiloj al venontaj komencantaj partoprenantoj:

- Memoru: Esperanto iam estis nova por ĉiuj
- Vi laciĝos – pauzu se vi bezonus
- Uzu la eblecojn por praktiki esperanton – kiam vi parolas, vi progresas
- Trankviliĝu – homoj estas bonaj helpantoj kaj vi ne estas ĝeno



La danaj partoprenantoj de la ĉi-jara SES

Voĉlegado de la revuo Esperanto

Jam de jaroj UEA, sub la gvido de S-ro Rob Moerbeek, provizas la voĉlegadon de la revuo Esperanto al vidhandikapitoj. Laŭ la propono de Martin Schäffer, la Estraro decidis oferti la sondosierojn ne nur al blinduloj, sed ankaŭ al ĉiuj membroj.

La tekstoj estas legitaj de volontuloj de pluraj landoj kaj eventuale estas uzeblaj ankaŭ por plibonigi aŭskultan komprenon de Esperanto. Vi povas aŭskulti ĉe <https://uea.org/revuoj/sono>.

Se ankaŭ vi volas kunlabori en tiu agado kaj voĉlegi paĝon de la revuo, bonvolu kontakti cid.emilio@gmail.com

Emilio Cid, estrarano de UEA pri informado



Trezoro, la redaktoro de la UNESCO kuriero en Esperanto sciigas nin ke oni povas elŝuti la duan numeron de la kuriero jene:

Estus ege bone se ĉiuj kiuj povas, elŝutus ĝin, por ke UNESCO vidu ke multaj esperantistoj ŝatas ricevi la kurieron en E-o. oni povas ankaŭ aboni la paperan version. Se vi tion volas fari, bonvolu sciigi min.

Ileana Schrøder, Libroservo de DEA (adreso sur p. 2)

<http://unesdoc.unesco.org/images/0026/002619/261900epo.pdf>

Unua “Forumo de Unesko-Kuriero”

Unesko-Kuriero en Esperanto profundigas la rilaton inter UEA kaj Unesko – UEA-reprezentantoj ĉeestis la 1-an Forumon de Unesko-Kuriero en la sidejo de Unesko

La 12-an de junio 2018, marde, okaze de la 70-jariĝo de Unesko-Kuriero kaj de la unujariĝo de ĝia relanĉo, Unesko oficiale okazigis la 1-an Forumon de la Kuriero en sia sidejo en Parizo. La ĉefredaktoro de Unesko-Kuriero en Esperanto “Trezoro” Huang Yinbao kaj la redakta asistanto Huang Xiaojuan (filino de Trezoro), la reprezentantoj de UEA Renée Triolle kaj Didier Janot, nome de UEA kaj de la teamo de Unesko-Kuriero en Esperanto, invitite ĉeestis.

Matene okazis fermita kunveno por la redaktoroj, tradukistoj kaj kunlaborantoj de la Kuriero, sub la gvido de Vincent Defourny, Direktoro de Publika Informado kaj Direktoro de la eldono de la Kuriero, kiu enkonduke diris, ke “la Esperantistoj tuj kaptis la pilkon” (lanĉis la Esperantan version post la interrompo de la eldono inter 2012 kaj 2017). La kunvenintoj diskutis pri la rolo de la Kuriero, pri ĝia influo al la publiko precipe al gejunuloj, pri ilustrado, pri plibonigo de la eldona kvalito kaj aliaj temoj. Renée Triolle, post simpla sinprezento nome de UEA, demandis, ĉu eblas verki artikolojn en aliaj lingvoj. La ĉefredaktoro Jasmina Šopova respondis, ke la redakcio akceptas artikolojn en ĉiuj lingvoj (kaj neniu ĝis nun verkis en Esperanto), kvankam ŝi antaŭe diris, ke ili mem alskribas eminentulojn, por ke ili verku pritemajn artikolojn. Tio signifas, ke ni Esperantistoj povus verki ankaŭ artikolojn en Esperanto.

La ĉefredaktoro de la Esperanta versio Trezoro Huang Yinbao en sia parolado unue esprimis koran dankon al Unesko pro la konsento eldoni la Kurieron en Esperanto, poste prezentis la evoluon de la Kuriero en Esperanto, la Esperantan teamon dise troviĝantan en 20 landoj, la legantojn en cent landoj, la kursojn en Koreio kies kursanoj uzas la Kurieron kiel lernolibrojn, la rezolucion de ILEI-konferenco, kiu rekomendas la Kurieron kiel lernan materialon, kaj la 103-an UK-n kun ĉirkaŭ 1600 Esperanto-parolantoj. Li diris, ke la teamo planas fondi voĉlegan grupon por krei aŭskulteban sonan version de la Kuriero. Li buŝe invitis la ĉeestantojn ĉeesti la 103-an UK-n en Lisbono.

Laŭ la plano de Unesko, la forumo plej eble okazos 1-2 fojojn ĉiujare. Trezoro Huang Yinbao proponis, ke Unesko okazigu la forumon ekster la Unesko-sidejo en aliaj landoj kaj en la internacia lingvo Esperanto. Ankaŭ la redaktoro de la ĉina versio proponis ke Unesko okazigu la forumon en Ĉinio. Antaŭvideblas, ke Ĉinio gastigos la forumon en venontaj jaroj. La redaktoroj de la araba kaj ĉina eldonoj diris, ke ofte iliaj lingvoj ne ankoraŭ kapablas traduki la novajn nociojn kaj tiel helpas la Kuriero al modernigo de la lingvo. Ankaŭ la membroj de la teamo de la Esperanto-versio samopinias. Dum la tradukado kaj redaktado ni devas pensadi pri

novaj terminoj. Feliĉe Esperanto estas pli facila ol naciaj lingvoj por krei novajn terminojn. En la kunveno Renée Triolle parolis en la franca lingvo kaj Trezoro en la ĉina lingvo. Oni samtempe tradukis la paroladojn en la anglan, la francan kaj la ĉinan lingvon. En la decembra kunsido 2017, la ĉefredaktoro Jasmina Šopova kaj ŝia koleginino regalis Trezoron, Stefan MacGill kaj François Lo Jacomo per ruĝa ĉina jasmena teo. Ĉi-foje Trezoro donacis al la laborantoj de la redakcio verdajn ĉinajn jasmenajn teojn.



La kvar reprezentantoj de UEA Huang Xiaojuan, Renée Triolle, Didier Janot kaj Trezoro Huang Yinbao (laŭvice ekde la unua maldekstre).

Posttagmeze okazis la Forumo. Komence la Ĝenerala Direktoro de Unesko Audrey Azoulay kaj la direktoro de Ĉina Eldona Administrado Zhuang Rongwen faris 7-minutajn salutajn paroladojn. Sekvis prelegoj de invititaj fakuloj kaj publikaj diskutoj inter la fakuloj. La ĉeestantoj povis nur aŭskulti. La kvar reprezentantoj de Esperanto planis kapti la ŝancon por peti ke la Ĝenerala Direktoro sendu al la 103-a UK salutan leteron. Bedaŭrinde ŝi foriris tuj post la saluta parolado dum la paŭzo.

Vespere okazis ĉina kultura vespero kun belaj kantoj, dancoj, muzikoj kaj operoj. En la tuta tago paralele okazis ekspozicio pri Unesko-Kuriero kaj ekspozicio pri ĉinaj kaj arabaj kulturoj. Kaj kiel kutime, koridoraj kontaktoj kun iuj konataj (aŭ nekonataj) homoj kaj intervenintoj, kiam ni povis kapti ilin por prezenti Esperanton kaj UEA-n.

François Lo Jacomo, unu el la UEA-representatoj ĉe Unesko kaj membro de la teamo de Unesko-Kuriero en Esperanto, kiu antaŭ la Forumo jam prenis la taskon mem kunporti al Unesko la paperajn ekzemplerojn de la Kuriero en Esperanto senditajn de Trezoro, povis ĉeesti nur la vesperan spektaklon, kun Nathalie Kesler. Tamen la antaŭan dimanĉon, kiam Trezoro atingis Parizon, François Lo Jacomo, Nathalie Kesler kaj Donald Gasper (el Hongkongo) aparte kunsidis kun Trezoro kaj lia filino en ilia hotelo por bone plani la ĉeeston antaŭ la forumo. Merkredon post la Forumo, en la sidejo de Esperanto-Francio, kun dekduo da lokaj aktivuloj, ni plilarĝigis la diskuton pri plibonigo de la eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto. Dum la kunveno kaj la Forumo, ni sentis ke la eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto certe bone impresis la Unesko-funkciulojn kaj plue kaj forte profundigas la rilatojn inter UEA kaj Unesko.

Salutmesaĝo de Unesko al UK



Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio.

Vi havas la ŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruciĝo kun diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo.

Mi ne dubas, ke tiu elstara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interŝanĝojn.

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj.

Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikiĝi.

Lingvoj estas la vektoro, kiu ebligas tiun dialogon; ili konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn ni devas konkretigi, kaj same por defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, precipe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias nuntempe, ke ili malaperas en ritmo de unu malapero dufoje monate. Tio estas giganta perdo por la homa heredaĵo. Ni devas plie defendi plurlingvismon en la instruado per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la reto, tiel ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco en ĉiuj homgrupoj. Gravus, ke ĉiu sukcesu esti en kontakto kun sia historio, sia identeco kaj la simbolaj resursoj de sia origina etno.

Tiu agado de Unesko ankaŭ estas *via* agado. Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto al ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de

la plimulto. Ĝi ebligas ekziston de homgrupo de parolantoj sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas alten iri kaj atingi kosmopolitikan konsci-nivelon, esti mondcivitano – ne forlasante siajn apartajn ligojn.

Via elektita temo por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?”

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via Movado kaj nia Organizo montras de jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn. Defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado.

Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluzivan kaj pacan.

“Multaj voĉoj, unu mondo” – jen la slogano de nia fame konata organo Unesko-Kuriero.

“Multaj voĉoj, unu mondo”, tiel tradukiĝas al Esperanto tiu idealo, kiun vi kaj ni havas – kaj kiu staras sur la versio de nia revuo, kiu nun aperas en Esperanto: Unesko-Kuriero.

Finfine mi volas transdoni, nome de Unesko, elkorajn bondezirojn pri la sukceso de via Kongreso.

Audrey Azoulay,

ĝenerala Direktorino de Unesko

[gaz kom uea 744]

Mesaĝo de UEA al UN

pri la Internacia Tago de Amikeco kaj Esperanto-tago

Estas feliĉa koincido, ke la Internacia Tago de Amikeco kaj Esperanto-Tago okazas ene de kelkaj tagoj unu de la alia.

Proponita al Unuiĝintaj Nacioj fare de Paragvajo en 1958, la Internacia Tago de Amikeco de UN (30-a de julio) festas la plej homan el ĉiuj ligoj – personaj kaj kolektivaj. Ĝi memorigas nin, ke kunlaboro plibonas ol konflikto, rekono de la bono en aliaj plibonas ol batalado pri la malbono,

kaj veraj internaciaj harmonio kaj kunlaboro postulas fidon. Ĝi memorigas nin, ke kultivado de amikeco je tutmonda skalo meritas fortan laboron.

La 26-an de julio 1887, Zamenhof publikigis sian internacian lingvon Esperanto. Zamenhof asertis, ke la esenco de la fido estas kompreno – kaj ke komprenon oni plej bone atingu per komuna lingvo. Li proponis Esperanton kiel facile akireblan neŭtralan lingvon inter parolantoj de malsamaj lingvoj. Hodiaŭ, centoj da miloj da homoj parolas ĝin tra la tuta mondo, kaj eĉ milionoj sin registris en lastaj jaroj por lerni la lingvon perrete.

Paroli la saman lingvon ne nepre alportas pacon, sed se oni ligas ĝin al amikeco, ĝi prezentas la plej bonan ŝancon por paco. Jen kial Esperanto-parolantoj uzas sian lingvon por antaŭenigi amikecon tutmonde. Ni alvokas al aliaj, ke ili solidariĝu kun ni.

Japano en Lisbono

Dum la UK en Lisbono Hori Jasuo respondecis pri 4 fakkunsidoj. Ili ĉiuj estis tre aŭ eĉ tro sukcesaj kun multege da partoprenantoj.

1. Esperanto-Sumoo

La intenco estis havi nur unu kunsidon pri tiu temo, sed Clay (Konstanta kongresa sekretario) proponis, ke estu pluraj, kaj laŭ lia konsilo du kunsidoj estis okazigitaj: la unuan en dimanĉo post la Inaŭguro kaj la duan en vendredo, antaŭtago de la Fermo, kaj dum tiuj 6 tagoj oni havis Lisbonan Konkurson de Sumoo. En la unua kunsido partoprenis 60 homoj, kaj el tiuj aliĝis 40 homoj al la sumoo. Preskaŭ ĉiuj estas partoprenantoj kaj partoprenintoj de la sumoo, do en la salono estis tre amika sento. En vendredo ĉiuj ricevis diplomon kaj estis kune fotitaj. Ĉiuj laŭdis la projekton de la sumoo kaj promesis pli kaj plu varbi partoprenontojn.

2. Prezento pri Japanio kadre de Kleriga Lundo

La 30-an de julio (lunde) okazis Kleriga Lundo, en kiu prelegis diverskampaj homoj. S-ino Claude Nourmont, respondeculo pri tiu tago, volis, ke estu facilaj kunsidoj por komencantoj, kaj petis al Hori Jasuo gvidi du kunsidojn: pri Japanio kaj pri nekutimaj objektoj en la mondo.

Al la kunsido pri Japanio venis pli ol 80 homoj, do la salono estis plenkaj kaj preparitaj dokumentoj mankis. La gvidanto prezentis: 1. Hajkoj kaj tankaĵoj pri la Fukuŝima-Katastrofo, 2. Kanto (“Sub la granda pomarbo”), 3. japanaj, ekzemple 5-piedaj ŝtrumpetoj, lignaj sandalojn geta ktp. kaj fine ni havis bingon temantan pri Japanio. Ĉiuj partoprenantoj havis novan scion pri Japanio kaj ricevis premiojn, tial ili estis tre kontentaj.

3. Prezento de nekutimaj objektoj

Lastan jaron Hori Jasuo havis koncerton per nekutimaj muzikiloj el la mondo, kaj s-ro Sylvain Lelarge, kiu estis tie, proponis fari kunsidon en Lisbono pri “nekutimaj objektoj” el la mondo. Ankaŭ li kolektas tiajn aĵojn. Antaŭ la UK Hori dissendis peton al siaj konatoj, ke ankaŭ ili kunportu tiajn aĵojn. Tial en la kunsido li, Sylvain kaj partoprenantoj alterne montris la objektojn. 50 partoprenantoj kun intereso rigardis la prezentojn.

4. Komuna kanto de “La Espero”

La himno estas nia valora trezoro, sed malmultaj homoj povas kanti ĝin parkere. Bedaŭrante tion, oni komencis havi tiun kunsidon de 2011 en Hanojo. Ĉi-jare partoprenis 40 homoj kaj ili kantadis la himnon por parkerigi ĝin. Fine estis ekzameno kaj 5 homoj sukcesis kaj ricevis diplomon. Ĝis nun 164 homoj estas diplomitaj, el kiuj 40 estas japanoj.

[landa agado]

Nova estraro de TEJO

En la lasta sesio de komitatkunsidoj de TEJO dum IJK en Badaĥozo, nova estraro estis elektita. Bedaŭrinde ne ĉiuj el la deziroj de DEJO estis plenumitaj en la nova estraro, sed mi tamen kontentas pri la novelektita estraro, kaj certas ke la estonta kunlaboro inter ĝi kaj DEJO estos fruktodona.

Mia Nordentoft

Jen la nova estraro: Prezidanto Tran Hoan (Ĝojo) el Vjetnamio; vicprezidantoj Léon Kamenický, el Slovakio kaj Francesco Maurelli, el Germanio; ĝenerala sekretario Konstanze Schönfeld (Tuŝka), el Germanio; kasisto Mung Bui (Feliĉa), el Vjetnamio; ceteraj estraranoj Hans Becklin (Hanso) el Usono, Arturo Crespo el Kolombio, Kingslim Edah el Benino, Olga Sevcenco el Moldavio.



*Estraranoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,
ĉeestintaj kaj elektitaj en la lasta Internacia Junulara Kongreso*

Ĉeĥa opero en Esperanto

La opero “La suferoj de Sternenhoch”, prezentita en la Nacia Teatro en Prago, estas la unua opero en historio, kies muziko estis komponita rekte laŭ teksto en Esperanto, farita de Miroslav Malovec. Muzikon kaj libreton komponis juna komponisto Ivan Acher. La Opero havis surprize grandan sukceson, ne nur ĉe la spektantoj sed ankaŭ ĉe la kantistoj, kiuj diris, ke Esperanton ili taksas ideala lingvo por opero. Okazis 5 spektakloj kaj ĉiuj estis tute disvenditaj tuj post ĝia premiero – ene de unu semajno! Eĉ du monatoj antaŭ la lasta spektaklo oni ne povis aĉeti biletojn.

Efektive ne necesis kompreni Esperanton por ĝui la spektaklon. Ĉio estis facile komprenebla pro la bela muziko kaj la aktoraj kapabloj de artistoj. Krome estis samtempe projekciitaj subtitoloj en la supra parto de scenejo en la ĉeĥa kaj la angla.



Laŭ kritikistoj temas pri unu el la plej sukcesaj operoj dum la lastaj 20 jaroj, prezentitaj en la Nacia Teatro. Bedaŭrinde en la sekvonta sezono ĝi ne aperos en la programo, ĉar la programo estis farita antaŭ la premiero de opero kaj neniu antaŭvidis tiel grandan sukceson. Post tiel granda sukceso estas probable ke la Nacia Teatro iam ripetos la operon kaj ke aperos studia sonregistraĵo de ĝi sur kompakta disko. Tiu disko enhavos ankaŭ intervjuon al la komponisto Ivan Acher, kiu tie sugestas prezenti la operon en la UK en Lahti.

Pavel Pavliček

Diverse internacie

Ĉerpitaj el la EKO-j (estraraj komunikoj) de Stefan McGill.

Nova versio de PMEG lanĉita



Publikiĝis nova versio de PMEG – la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko.

La nova versio havas la numeron 15.0.2. Ĝi estas plua ŝtupo cele al dua eldono kiel papera libro. La aŭtoro, Bertil Wennergren, faris ankoraŭ multajn ĝustigojn, kompletigojn kaj ĝisdatigojn, sed plu restas multo por fari. PMEG 15.0.2 haveblas ankaŭ en elŝutebla formo kiel HTML kaj kiel PDF. <http://bertilow.com/pmeg/>

La produktiva Brazila Kolekto

Regule multaj el ni ricevas mesaĝojn pri tiu brazila braz-ilo de muzika kreivo. Jen pecoj el lastatempa komuniko:

“Jen tria versio de kanto de Stevie Wonder: Nur pro am' mi vin alvokas, tradukita de Antonio Luís Lourenço dos Santos. Temas pri kanto originale verkita en la angla lingvo, poste tradukita al la portugala de Gilberto Gil, kaj esperantigita el la portugala versio. Tial, el la retejo BRAZILA KOLEKTO ĝi estas en la kategorio Versio de versio.



Konatiĝu kun la bunto: <http://brazilakolekto.blogspot.com>

Flávio Fonseca koncertis en la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Kuritibo, kaj kantis ĉefe repertuaron el la retejo Brazila Kolekto!”

Urba placo omaĝas pionirajn esperantistojn

Fine de majo en Massa, Italio, la urbestro titolis urbocentran placon ‘Mario e Catina Dazzini esperantisti’. La placo estas proksima al la aktuala sidejo de la Nacia Biblioteko de Esperanto, kiu estis unu el la multaj iniciatoj de la du mondkonataj samideanoj, kaj kiu estis unu el la plej pezaj kaŭzoj de la honoro nun atribuita al ili. Mario Dazzini ankaŭ estis plurjara prezidanto de ILEI.

Landa agado de UEA

Fine de januaro Universala Esperanto-Asocio unuafoje en sia historio aperigis ampleksan novan analizon pri la stato de niaj landaj asocioj kaj landa agado. Ĝi klare montris, kiel rete liveritaj dokumentoj povas doni multe pli riĉan bildon pri niaj landoj ol iam ajn eblis per fizike presita Jarlibro. Reta Jarlibro havas sencon, nur se ĝi estas regule ĝisdatigata. Tial, la tuta prezento estis aktualigita fine de junio kaj jam aperas en nia asocia retejo.

Por rigardi la novan kompletan, iru al la retejo de UEA kaj rigardu la menuon ĉe ‘Asocio’. En la PDF ni montras bildon de la loko por aliri la prezenton.

Uzeblas la sekva ligilo: <https://uea.org/asocio/gvidilo>

Jen la ĉefaj eroj, kiuj estis aktualigitaj por la nova eldono de junio 2018:

- La nombro de Individuaj Membroj (IM) ĝisdatigitaj por 2017 laŭ la maja revuo Esperanto.
- Ĝisdatigo de la ciferoj pri la pagipovo de landoj (nominala MEP – dane BNP)
- Resuma tabelo de pagipovo (MEP) por la landoj de ĉiu regiono, tipe laŭ kvar kategorioj.
- Aldono de Kamboĝo kaj Laoso al la listo de landoj por Azio.

Katalin Kováts premiita

Premio Onisaburo Deguĉi estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per kapitalo donacita de Oomoto. Ĝi celas distingi meritajn agantojn, kiuj longtempe laboris per Esperanto por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de Onisaburo Deguchi. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj.

Per decido de la Estraro de UEA, Premio Deguĉi de la jaro 2018 estas aljuĝita al Katalin Kováts.

Malmultaj homoj en la historio de Esperanto faris pli grandan kontribuon al ĝia instruado tutmonde ol Katalin Kováts. Filino de instruistoj, ŝi specialiĝis en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj pri lingvoinstruado, interalie pri la rusa kaj itala lingvoj. Esperanto tamen fariĝis ŝia granda specialiĝo kaj pasio. Post studoj en la fama Esperanto-fako de ELTE-Universitato en Budapeŝto, ŝi fondis kaj estris Esperanto-fakon en la



Pedagogia Altlernejo de Szombathely (1990-1994). En tiu tempo ŝi ankaŭ plurfoje volontulis en Hago, en la Cseh-Instituto, aranĝis la metodologiajn verkojn de Andreo Cseh kaj Audrey Childs-Mee, trejniĝis kiel gvidanto de Cseh-seminarioj kaj verkis memorlibron pri Andreo Cseh. Ekde 1995 ŝi estis vicredaktoro de Internacia Pedagogia Revuo (IPR) dum pli ol dek jaroj.

En 2001, kun la subteno de ESF, Katalin kreis la retejon edukado.net, kiun ŝi ankoraŭ prizorgas hodiaŭ. De tiam Esperanto estas ŝia plentempa okupo. Kadre de tiu laboro ŝi gvidis kursojn kaj seminariojn en trideko da landoj; interalie, ŝi regule kontribuas pri lingvoinstruado al la programo de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano. Aldone al la ĉiam kreskanta kaj riĉiĝanta enhavo de edukado.net, kies membraro nun nombras pli ol 5000 homojn tra la mondo, en 2005 ŝi komencis la laboron por starigi Esperanto-ekzamenojn laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo. Ekde 2008 ŝi gvidas la tutan KER-ekzamenan

sistemon, kiu ampleksis pli ol 100 ekzamensesiojn en trideko da landoj kun pli ol 2000 sukcesintoj. Krome, ekde la pekina UK en 2004, ŝi kontinue okazigas kun sia edzo, Sylvain Lelarge, kongresajn paroligajn kursojn je du niveloj en 16 lecionoj. Ŝia libreto por lernantoj, Poŝamiko, vendiĝis en pli ol 10.000 ekzempleroj.

Tiuj, kiuj partoprenis la kursojn de Katalin, scias ke ŝi ŝatas instrui vigle kaj kree, kun multe da humuro, movo, arto. Tion ni vidas en kelkaj el ŝiaj aliaj iniciatoj, kiel la populara kvizludo RISKO, aŭ la kurso kiun ŝi ellaboris pri Vincent van Gogh, aŭ la belaj vitraj juveloj, kiujn ŝi ŝatas hejme fari kaj vendi. Entute ŝi sukcesas vivigi la ideojn de Zamenhof, ke oni povu lerni la lingvon ludante, kaj ke lingvo internacia estu ankaŭ lingvo arta. Per la Premio Deguĉi ni celas rekoni ŝian mirindan kombinaĵon de inventemo, laborkapablo kaj homa varmo, kiuj igas ŝin vere elstara edukisto kaj portanto de la noblaj ideoj de monda paco kaj homa feliĉo.

[gaz kom uea 750]

Pliaj 14 elstaraj diplomitoj

En la Solena Fermo de la 103-a Universala Kongreso en Lisbono estis anoncitaj la nomoj de 14 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.



Diplomo pri Elstara Agado

José Antonio del Barrio (Hispanio) pro la elstara gvidado de la hispana movado, kiel prezidanto de la Landa Asocio. Aparte agnoskindaj estas la iniciatoj kies efiko estas la plifortigo de faka agado: la komunaj hispanaj kongresoj kun ILEI en 2018 (Madrido) kaj kun IFEF en 2019 (Malago), kun apartaj meritoj pri kultura, informa, alekstera agado.

Ranieri Clerici (Italio) pro la elstara agado en UEA (iama estrarano kaj vicprezidanto, iama delegito de UEA en Ĝenevo ĉe UN); en Italio, inter alie pro la prizorgo dum multaj jaroj de la rilatoj de Itala Esperanto-Federacio kun la ĉefa televid- kaj radielsendo (RAI).



Maritza Gutiérrez González (Kubo) prezidantino de Kuba Esperanto-Asocio, pro la longtempa aktivado en Kubo (ĉeforganizado de la TAKE 2018 en Havano; agado ĉe la Esperanto-redakcio de Radio Havana) kaj en UEA (iama estrarano kaj komitatano).

François Lo Jacomo (Francio), matematikisto, membro de la Akademio, pro la multjara reprezentado de UEA ĉe Unesko en Parizo, inter alie kiel ĉeforganizanto de la ceremonio de la 11-a decembro 2017.

Sun Minĝiao “Semio” (Ĉinio) pro la fondo kaj estrado de la Esperantomuzeo en Zaozhuang-Universitato kaj la sukcesa enkonduko de Esperantofako ekde la venonta semestro.


Mónika Molnár (Hungario) pro la rekonata lerto kiel instruistino, lernejgvidantino, altnivela pedagogo.

Masako Tahira (Japanio) pro la longdaŭra laboro por Esperanto, aparte en la kampoj tradukado kaj reviziado kaj pro la elstara aktivado en la Kansaja regiono; krome pro la plurjardeka engaĝiĝo en la ĵurio de Oratora Konkurso.

Zlatko Tišljár (Kroatio/Slovenio) pro la granda rolo ĉe kreo de la zagreba metodo kaj la longjara aktivado kiel instruisto, sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), redaktoro de la Eŭropa Bulteno, organo de EEU.

Diplomo pri Elstara Arta Agado

Cristina Casella (Italio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel kantisto de pluraj mondscale konataj nuntempaj kantoj, tradukitaj al Esperanto, kies videoj furoras ĉe Youtube kaj sociaj retoj.



István Ertl (Hungario/Luksemburgo) pro la elstara kontribuo al la Esperanta literaturo, kiel verkisto, aŭtoro interalie de La Postdomo; ankaŭ kiel aktiva ĵuriano de Fondaĵo Grabowski.

Fabrice Morandeu “FaMo” (Francio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel akordion-ludanto, kantisto, aktiva membro de la Kompanoj kaj inter alie pro la ĵus lanĉita albumo “Brel en Esperanto”.

La Perdita Generacio (Svedio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, kiel populara popmuzika bando, kies muziko ĝojigis centojn da homoj dum junularaj kaj kulturaj aranĝoj.

Cyrille Poulet “Platano” (Francio) pro la elstara kontribuo al la repstila Esperanto-muziko, interalie per la eldono de la unua hiphopa KD en Esperantio, en la duopo La Pafklik, kaj la daŭra aktiveco unuope, sub la artista nomo Platano.



Martin Wiese (Svedio) pro la elstara kontribuo al la rokmuzika Esperanto-kulturo, interalie kiel kunfondinto de la bando Persone kaj la daŭra furoreco nun, unuope aŭ kun la Talpoj.

[gaz kom uea 746]

Grabowski-premiitoj

La Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG) estis kreita sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912–2005). Ĝia regularo estis novformulita en 2017. La fondaĵo, portanta la nomon de “la patro de la Esperanta poezio” Antoni Grabowski, celas subteni la Esperantan kulturon per premioj kaj subvencioj. La ĵurio de FAG, kiu de 1984 aljuĝas premiojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron, nun konsistas el Ulrich Lins, Shi Chengtai kaj István Ertl. La administradon de la Fondaĵo prizorgas la Centra Oficejo de UEA.

La ĵurio gratulas la tri ĉi-jarajn premiitojn kaj ĝoje notas, ke en 2018 ni festas la centan datrevenon de la apero de *Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz, nome de la Esperanta traduko farita de Antoni Grabowski. En la Lisbona UK estis anoncitaj la jenaj du premioj:



La unua premio (750 usonaj dolaroj) iras al **Sten Johansson** (Svedio). Li ricevas ĝin pro sia elstara kontribuado al la literaturo de Esperanto. Unue tradukinte en Esperanton el la sveda (ekde 1982), li de 1986 verkis imponan kvanton da prozo originale en Esperanto kun vasta gamo de temoj. Inter ili estas facillingvaj krimromanetoj, sed ankaŭ romanoj pli ampleksaj (laste, *Marina ĉe la limo*), kiuj trovis multe da sukceso pro sia stilo, ofte ironia aŭ humura. Pluraj liaj verkoj estis premiitaj en Belartaj Konkursoj. En 2000 li kreis retejon pri *Originala Literaturo Esperanta* (OLE), kiu kreskis al granda sciobanko pri aŭtoroj kaj verkoj, inkluzive de 1600 recenzoj. Johansson tradukis krome verkojn de Virginia Woolf. UEA distingis lin en 2014 per “Diplomo pro elstara arta agado”.

La duan premion (400 usonaj dolaroj) ricevas **Gonçalo Neves** (Portugallio) kaj **Bernhard Pabst** (Germanio) pro sia komune kompilita Historia vortaro de Esperanto 1887–1889. Tio estas konkordanco, kiu notas ĉiun

unuan uzon de vorto en la komenc-tempa epoko de Esperanto; iniciatis ĝin Reinhard Haupenthal. Ambaŭ honoritoj aktivas ankaŭ alikampe (Neves ĉijare per la kolektoj *Periskope* kaj *Recenze*), sed la premio celas esprimi laŭdon al ili pro la (daŭranta) projekto dokumenti la originon de la lingvo Esperanto.

Nia filmo

Jutlandaj aventuroj. Somer-ekskurse la klubo de Århus vizitis Ålborg:



Taskoj en Kopenhago. La ĉefurbanoj ekskursis ne tiel longe for de hejme (en la parko de Valby), sed tie solvis diversajn ne lingvo- rilatajn taskojn:

